
# *Kuba prezidento ree kondamnas la usonan blokadon kontra? la insulo*




Havano, okt 7 (RHK) La prezidento de Kubo, Miguel Díaz-Canel, per sia tvitera konto, kondamnas la validecon de la ekonomia, komerca kaj financa blokado trudita de Usono al la insulo.

La prezidento skribis en la socia reto “Surdaj oreloj de la imperio pri la regiona pretendo de #NoMásBloqueo, sed ?iam preta por mensogo kaj kalumnio. Kia malmoraleco, kia malhonoro, kia perverseco, kia malhonesteco, kia manko de digno! #CubaLiveInItsHistory"

Siaflanke, la ministro pri eksteraj aferoj Bruno Rodríguez denuncis en sia Tvitero, ke la turneo tra Latin-Ameriko de la usona ?tata sekretario, Anthony Blinken, celas defendi la malamikan politikon de sia lando kontra? la insulo.

Rodríguez asertis “La usona ?tata sekretario venis al Latin-Ameriko kaj Karibio por provi defendi la misuzon kontra? #Kubo, anta? la preska? unuanima alvoko ?esigi la blokadon kaj la maljustan nomumon en la listo de ?tataj sponsoroj de terorismo. Li povis respekti la veron kaj li ne faris."

La estro de usona diplomatio alvenis al ?ilio ?i ?a?don post vizito al Kolombio, kie li renkonti?is kun la prezidento, Gustavo Petro, kiu priskribis la usonan decidon konservi Kubon en la listo de landoj, kiuj supozeble subtenas terorismon kiel maljusta, kiam la insulo estis garantianto de la pacinterkonsentoj.

Blinken finos sian turneon en Peruo, kie li planas renkonti?i kun la prezidento, Pedro Castillo, kaj partopreni la ?eneralan asembleon de la Organizo de Amerikaj ?tatoj.

Kubo prezentos la 2-an kaj 3-an de novembro al la ?enerala Asembleo de Unui?intaj Nacioj la rezolucion pri la neceso ?esigi la ekonomian, komercan kaj financan blokadon trudita de Usono.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/301243-kuba-prezidento-ree-kondamnas-la-usonan-blokadon-kontrau-la-insulo

**Radio Habana Cuba**